

TEJO KAJ RELIGIO

Ĉu TEJO povas okazigi eventon en religia konstruaĵo kaj kiukondiĉe?

Jes, kondiĉe ke la ejo estu alirebla al ĉiuj partoprenantoj sen diskriminacioj rilate al nacieco, raso, sekso, seksa orientiĝo, handikapeco, religio, politiko, socia deveno kaj lingvo, kaj ke la principoj de TEJO priskribitaj en ĝia statuto estu respektataj en ĉiu momento.

Okazigi eventon en religia konstruaĵo ne signifas, ke TEJO estas religia organizaĵo; same kiel okazigi eventon en registara konstruaĵo ne signifas, ke TEJO estas registara organizaĵo.

Ĉu povas okazi religia ceremonio aŭ programero dum TEJO-evento?

TEJO estas nek religia nek kontraŭreligia organizo. Malpermesi religian ceremonion dum TEJO-evento, nur pro tio ke ĝi estas religia, signifus ke TEJO estus kontraŭreligia organizo, ĉar ĝi diskriminacius religion. TEJO ne diskriminacias religiojn kaj ĝi traktas ĉiujn ideojn same. Sekve, religirilataj programeroj povas okazi nur se ili kongruas kun la statuto kaj, kondiĉe ke ili okazas en Esperanto, ili povas eniri en la oficialan programon.

Ĉu TEJO kunlaboras kun certaj religioj?

TEJO ne estas religia organizo, sed foje estas komunaj streboj kiuj celas ŝanĝojn en la socio. Ĝi povas kunlabori kun religioj kiuj subtenas ĝiajn celojn, limigante la kunlaboron al tiuj kampoj.

Kiel TEJO rilatas al Oomoto, Ŭonbulismo, Bahaismo, Spiritismo aŭ aliaj religioj?

Ĝi bonvenigas ankaŭ religian uzon de Esperanto, tamen ĝi traktas ilin kiel ĉiujn aliajn religiojn, laŭ la respondo al la antaŭa demando.

Ĉu TEJO oficiale subtenas homaranismon?

Subteni homaranismon kiel la oficialan religion de TEJO ne kongruas kun ĝia religia neŭtraleco. Tio ne signifas ke ĝi ne konsentas pri kelkaj principoj, same kiel povas okazi ke ĝi konsentas kun principoj de aliaj ideoj kiuj kongruas kun ĝia statuto.